2-a Jaro, N-o 8 (60)

APERAS S.A.T. SEMAJNE

19. Novembro 1925

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Korespond-adreso: "Redakcio de Sennaciulo", Colmstr. 1, Leipzig-Stö. (Germ.) | Gvidanto: Ekzekutiva Komisiono de SAT 23, rue Boyer, Paris XX | Administranto: R. LERCHNER Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz

Sur la tegmento de l'mondo

Ĝi estas Tibeto — la plejalta plataĵo de l' mondo (ĉ. 4000 metroj super marnivelo). Tibeto areas ĉirkaŭ 1100000 kvadr. kilometrojn kaj nun havas 7000000 loĝantojn, kiuj plejparte brutkulturas migrante tra la lando kun siaj porteblaj feltodomoj. Ĉefurbo de la lando *Lassa'* nun havas pli ol 45000 loĝantojn kaj estas fama kiel Romo de mezazia budhismo, ĉar ĝi estas sidejo de tibeta papo nomata *Dalaj Lamo.* Li estas samtempe absoluta monarĥo de Tibeto. Sed ondoj de l' imperiismo atingis eĉ Tegmenton de la mondo. Angla kapitalo per ekonomiaj rimedoj ĉiel penas subigi Tibeton. Tuta komerco de la lando trafis en manojn de la Kapitalo, kiu nun jam planas ekspluati ĉiujn riĉaĵojn de l' plataĵo. Inter Lassa kaj Hindio estas konstruita telegrafo. Kaj en plej fruktodona ĉelima parto de la lando oni aranĝas fabrikojn. Anglio komprenas, ke posedanto de Tegmento nepre minacos al tuta Hindio, kaj tial ĝi rapidas ekonomie subigi Tibeton. Kapitalo ĉiel penas favorigi la politike tre potencan pastraron de Tibet. La kapitalo liveras armilaron por Tibeta armeo kaj rekompence ricevas ĉiuspecajn privilegiojn. La kapitalo penas per rimedoj de edukado anglemigi Tibetan junularon kaj armeestraron. Sed ĝi ne bone sukcesas, ĉar nek pastroj nek popolo Tibeta inklinas al ĝi. Tial ĝi ekagis laŭ la principo: *dividu kaj imperiu.*

Ĝi akcelas disgrupiĝon en politiko de Tibeto. Jen kion faris la disgrupiĝo antagonisma inter Tibetanoj. *Dalaj Lamo* havis sian helpanton *Banĉen-Lamon,* kiu protestis kontraŭ altaj impostoj (en ĉelima provinco *Czan*) bezonaj por subteni novan armeon. Monaĥejoj rifuzis pagi la imposton. *Dalaj Lamo* sendis *Namĵilon* kun militistoj por obeigi la rifuzintojn. Banĉen Lamo forkuris Ĉinion kaj petis helpon promesante doni al Ĉinio ĉerandan provincon *Czan* kiel rekompencon, sed ne sukcesis. Grandegaj impostoj kaj severaj agoj de *Namĵil* indignigis loĝantaron, kiu sendis delegitaron al Dalaj Lamo kun peto eksigi la aventuriston Namĵilon — "perfidintan pro angla mono". Sed Dalaj Lamo eĉ ne volis paroli kun la delegitoj. Tiam popolo ekribelis, sieĝis domon de Namĵil kaj verdiktis al li morton pro perfido. Nun Dalaj Lamo mem savis lian vivon, metinte lin kiel krimulon en subteran kelon (100 kil. de Lassa'), kie li devas troviĝi ĝis sia morto. Dalaj Lamo estis devigita limigi potencon de siaj ministroj kontrolotaj de homoj, kiujn fidas la popolo. Sed li ne bone sukcesas, ĉar Kapitalo ĉiam subŝovas anglemajn agentojn, per kiuj ĝi daŭras almanigi riĉaĵojn de la lando. Tamen naci-liberiga movado en Oriento kreskas. Same kreskas interne klasa antagonismo. Kaj ĉi kaŭzoj kune fiaskigos finfine ĉiujn penojn de Kapitalo. Sed nun akra politika krizo skuas Tibeton kaj iom post iom senvualigas misterojn de dio, metitan sur Tegmenton de l' mondo.



Krjukov kaj Lesnikov.

JAM NUN REMEMORU PRI RENOVIGO DE VIA KOTIZO KAJ ABONOJ!

Kun la germana delegacio laborista al Sovetlando!

V.

Ĉar ni nature ankaŭ intereson havis por la edukado de la infanoj, ni iutage vizitis infanan vilaĝon en la ĉirkaŭaĵo de Moskvo. Tagmeze ni forveturis en 15 aŭtomobiloj en la direkto "Buŝkin", kiel nomiĝas la restadejo de multaj infanoj. Laŭlonge la ŝoseo kondukanta al la urbo Tver rapidege ni postlasis Moskvon kaj baldaŭ densa netrapenetrebla polvo envolvis nin, en malmultaj minutoj nin ŝanĝante en malbonaj karikaturoj de kamentubpurigistoj. Alveninte en la kolonio ni estis akceptataj per ĝoja bruo, per trumpetado kaj muziko. (Preskaŭ mi emis suspekti la kunvenantajn infanojn, ke ili des pli ĝojis, ĉar ni aspektis kiel la nigra viro, plej bone konata de malobemaj malgranduletoj).

Post kelkaj alparoladoj ni sciis, ke dum somero pli ol ses mil infanoj de ambaŭ seksoj pasigas en ĉi-tiu vilaĝo sub la gvidado de instruistoj kaj vartistinoj la someran libertempon. La vilaĝo mem konsistas el multaj domoj lignaj kaj ŝtonaj. En ĉiu loĝas la infanoj, grupigitaj laŭ sekso kaj aĝo. Ĉiu grupo estas devigita priservi mem la konservadon de la loĝejoj, krom tio la pli maljunaj devas gardadi la geetulojn. En kelkaj dometoj la junaj enloĝantoj devas prepari por si mem la nutraĵon; ili povas mastrumadi tute memstare. Tamen oni neniam povis observi malordon aŭ malpurecon. En malo ni vidis, ke ofte la infana fantazio bonsukcese ornamis la diversajn ĉambrojn per memdesegnitaj bildoj aŭ aliaj produktaĵoj de diligenteco inter la loĝantoj. En anguloj ŝtonkolektoj atestis la guston de sia posedanto. Entute ni estis surprizitaj pri la vivo en la kolonio, kaj longe mi meditis pri tiuj-ĉi institutoj, kreitaj por la venonta generacio de rusa proletaro. Ĉi-tie la vorto, ke al la junularo apartenas la estonto, ricevis novan signifon; kaj kontente mi konstatis, ke la vojo de la hodiaŭa infanedukado garantias, ke la komencita de la patroj verko estos plukondukita antaŭen kaj supren de la nova, juna generacio.

Per vizito en la al la kolonio apartenanta malsanulejo ni konvinkiĝis pri la sama ordo kaj pureco, jam konata el aliaj similaj institucioj, kaj poste ni forlasis la vilaĝon, ne sen antaŭe esti la gastoj je malluksa manĝado.

Ĉe la sportuloj

Sportuloj inter nia delegacio insistis, ke ni ankaŭ iru al la rusa sportunuiĝoj. Speciale la naĝklubo honoris nin per impresa naĝfesto. En la rivero Moskvo ĝojis viroj kaj virinoj, knaboj kaj knabinoj. En la de bretoj ĉirkaŭita placo de la klubo atendis la klubmembroj je nia alveno. En longaj vicoj de la gekamaradoj, vestitaj per la simpla bankostumo ni entuziasme estas salutitaj, kaj mi miris kaj miris: Tiuj-ĉi do estas la bolŝevikoj! Homoj en bona saneco, kun ĝojo kaj gajeco en la vizaĝoj. Mi ne povis trovi diferencon en ilia aspekto, tute la samajn, tute la samajn. Nur la lingvo estis la sola barilo, kaj kiel mi, ankaŭ ili sentis la mankon de komuna kompreniĝilo, eble nia vizito ilin interesos por nia lingvo.

La diversaj naĝludoj kaj vetbataloj lasis ekkoni lertecon kaj kapablecon, posta travido de klubaj rezultatoj atestis nin la atentindan povon de la klubanoj. En estonta kuna olimpiado, inkluzive la rusaj kamaradoj, la hodiaŭaj venkintoj devas streĉi ĉiujn siajn fortojn, se ili intencas resti sur la venka loko.

Dum la prezentado estis allogitaj multaj boatoj direktitaj de remklubanoj, ni eksciis, ke ankaŭ remado estas tre ŝatata sporto. En Moskvo mem ekzistas multaj tiaj kluboj, oni rakontis al ni; kaj ni kredis vidante la amason de ŝancelantaj gondoloj.

Satiginte nian scivolemon ni adiaŭis nin, kaj eniris motorboaton, kiu portis nin al la proksimaj Leninmontetoj, kie en la klubdomo remista ni konatiĝis dum bankedo kun la klubmembroj. Mi mem ja ŝatas ion bonan por manĝado, tamen mi baldaŭ preferis malaperi de la tablego, kaj kaŝe mi eliris ĝardenon. La ĝardena barilo ne estis malhelpaĵo por mi, por baldaŭ stari ekstere. Sur la rivera bordo amuziĝis malsanuloj el apuda sanatorio. Post kelkaj minutoj jam "flua" parolado funkcias, mi petis ilin kanti kelkajn rusajn popolkantojn, kion ili ankaŭ volonte faris. Sed ho ve! venis la turno ankaŭ al mi. Mi petis, ke ili indulgu min, ĉar mi estis konscia pri mia "bela" voĉo, sed ĉio estis vana, ili restis sen kompato. Do mi kantis, kaj malgraŭ la aplaŭdo mi kredis, ke, se ili prijuĝis la bonsonon de la germanaj popolkantoj, tiam ili certe bedaŭrus nin germanoj. Je la dekunua ni devis reiri, tro frue por ĉiuj. Kore ni (aliaj kamaradoj sekvis mian ekzemplon) lastfoje interŝanĝis manpremojn kaj kune kun la aliaj ni revenis al nia hotelo en Moskvo.

(Daŭrigota).

El Svisujo

En la nuna momento, kiam oni povas vidi en Eŭropo veran marŝadon al socialismo, taŭgas ĵeti etan rigardon sur la svisan socialan movadon.

Antaŭ la milito, Svisujo estis konsiderata kiel plej demokrata kaj gastema lando; ĝiaj institucioj utilis kiel ekzemplo por multaj popoloj. Per la milito la menso multe ŝangiĝis; la burĝaro ege utilis la perpresan encerbumadon, kaj la reakcio blovadis fortege; ni hontus esti svisoj, se ne okazus same en ĉiuj landoj.

Spite la senkuraĝiĝo, grava ĝenerala striko okazis dum novembro 1918 per kiu la svisa laboristaro gajnis la okhoran labortagon.

En 1923, okaze de la porpaca Konferenco de Lausanne, la rusa delegito Worowski estis mortpafita de Konradi, svisa eksoficiro de blankarmeo. La senkulpeco de la svisaj registaroj ne povis esti elmontrata. La ĵurnalaro preparis la opinion kaj la reakciulo, advokato Schopfer sukcesis liberigi la krimulon. Ĉu vi kredus, ke la tuta Lausann'a loĝantaro delire aplaŭdis tiun juĝon? Estis penige por la kelkaj homoj, kiuj konservis sian kapon!

Pasis jaroj; la laboristaro suferadis kaj rekomencis organiziĝi. La ĵus farita parlament-balotado laŭte parolas pri progreso. En 1919 estis elektitaj 38 socialistaj deputitoj; 43 en 1922 kaj 49 en 1925 plue 3 komunistoj. La tuta nacia deputitaro nombras 200.

Notinde estas, ke en Lausanne, la fama advokato Schopfer ne estis reelektata, dum en sama loko iu plia socialisto gajnis lokon.

La irado maldekstren estas despli kuraĝiga por la socia laboristaro.

El Aŭstralio

Aginte kontraŭ la gvidantaro de la Brita unuiĝo la strikantaj maristoj anglaj en Aŭstralio montris solidarecon en sia batalo kontraŭ la malaltigo de sia salajro. Ili estas subtenataj de la aŭstralia marista unuiĝo, kaj eble el tiu ĉi lukto venos la internacia unuiĝo de maristoj kaj la fino de Havelok Wilson kun sia bandaĉo de trompistoj.

Ĉiuj unuiĝoj en Aŭstralio laboras sub kondiĉoj imponitaj de la arbitra juĝejo; kaj striko subtenata de unuiĝo, dum ekzistas juĝado, estas kontraŭleĝa, kaj la puno estas plejparte monpuno. Tial, kiam kondiĉoj sur iu ajn ŝipo estas malbonaj (tio okazas ofte spite la juĝado) la maristoj strikis sur tiu ŝipo solaj. Tiuspeca striko estas nomata "Job Control" kontrolo de okupo kaj multe ĉagrenas la ŝipestrojn kiuj fine kaj sukcese plendis al la juĝejo por nuligi la kondiĉojn donitajn de ĝi. Iuj ekkomencas peni por subpremi la maristojn per pli malfacilaj kondiĉoj. Striko okazis kaj post ses semajnoj la ŝipestroj konsentas ĉiujn kondiĉojn, sed postulas, ke la maristoj neniam plu uzos "Job Control" tiu ĉi senvalora promeso estas donita.

Dum preparado por la venonta hombuĉado en la paca Oceano, la usona militŝiparo venis al Aŭstralio la lastan julion; antaŭ ol ili alvenis, la ĉefministro "Bruce" (Brus) parolis ĉe la klubo de riĉuloj, li insultis la tiam strikantajn maristojn, kaj ĉiuj burĝaj gazetoj laŭdis lin. Bone por Brus. Sed kiam Brus volis veturi per ŝipo kun siaj karaj geamikoj, por bonveni kaj festadi ĉe la ĵus eniranta usona militŝiparo, la maristoj demandis skribitan apologion de li, aŭ la ŝipo ne estus veturinta. La gastoj sur tiu ŝipo tre ĉagrenis kaj tiel plu, ili penis certigi al la maristoj, ke Brus ne estas sur la ŝipo kaj volis garantii monsumon.

La maristoj respondis, ke ili ne fidas al Brus kaj liaj amikoj, tial la cent funtoj sterlingaj estu donataj al la aŭstralia marista unuiĝo. Sen kaŭcio ili ne veturos. Malĝoje la gastoj hejmeniris kaj kompreneble la burĝa gazetaro ne laŭdis, sed incitis pro tiu grandega ofendo al Brus.

Leĝiĝis dekreto, per kiu iu ajn persono aŭ personoj ne naskita en Aŭstralio, kiu estas komunisto, aŭ kaŭzas aŭ partoprenas en striko, povas esti elpelita el la lando. Nun estas proceso kontraŭ du gvidantoj de la marista unuiĝo "Walsh kaj Johnson" tiuj unuiĝoj forte kontraŭstaras la leĝon kaj eble baldaŭ venos granda malpaco.

En Kvinslando la fervojistoj strikis kontraŭ la t. n. "laborista" registaro ŝtata. Post unu semajno la registaro cedis en ĉiuj demandoj krom la 35-hora semajno por la skribistoj. Post voĉdono la laboristoj en la sudo revenas al laboro, sed en la nordo ili ankoraŭ strikas ĝis lasta demando estos ordigita. *SAT-ano 772*

Kion fari dum revolucio?

Al tiu artikolo en "Senn." n-ro 3 kelkaj respondoj: Kredante, ke ne estas bone, tro esperi pliboniĝon kaj ŝajnigi ĉion malfacile post veninta ŝanĝo de l' sociordo. Mi sentas necesa, urĝe sciigi miajn pensojn tiurilate.

La aŭtoro diras en la lasta parto, ke post ŝanĝita sociordo estas necese labori nur 2½—3 horojn potage, kiel komuna devo. Sed, en la nova sociordo la homaro entute, kiel laboristaro, havos plimulte da bezonoj ol nun. La nuna salajro por la laboristaro estas ĝenerale tro malalta por vivi hominde. En la malnova sociordo malmulte da homoj vivas lukse, kelkiuj kompreneble eĉ diboĉe, tamen la granda plejmulto ekzistas nur en mizero. Sed en la nova sociordo ĉiuj rajtas vivi hominde.

Pro tio estonte por la homoj kiel la laboristoj estas bezonataj pli altaj salajroj kaj eble anstataŭ 2½—3 horojn ili devus labori 5—6 horojn potage. Mi opinias, ke neniu estos trovanta tion kiel premon, sciante, ke ĉiu laboras por si mem kaj konservo de l' komunuma mastrumado.

Plue estas nedezirinde, ke ioma kulturo perdiĝos. Do, la t. n. luksokupo daŭru en sia ekzisto en proporcia stato.

K-dino *A. B.*

EL ANGOLA

Vivo kaj moroj de indiĝenoj .

IV

La infano: naskiĝo kaj plenaĝiĝo

Pri la higienaj zorgoj aŭ superstiĉaj kutimoj ĉirkaŭantaj la virinon dum la gravedeca periodo kaj ĉe la naskomomento tre malmulto estas konata.

Inter la *Ba-Sele,* la nasko okazas en la domo de l' patrina avino kun helpo de maljunulino (specialigita je akuŝaferoj) kaj ĉeestata de la tuta ina parencaro kaj amikinoj, inter kiuj, tamen, ne povas troviĝi iu ajn havinta seksorilatojn kun la edzo. Tuj kiam la infano naskiĝis, la patro donacas kelkajn metrojn da drapo al sia bopatrino kaj litokovrilon al sia bopatro, kion ĉi-lastaj rekompencas per unu porko. Samtempe, la fakto estas komunikata al ĉiuj familianoj. Post ok tagoj la infano estas baptata ricevante nomon de praulo. Tamen, se la infano naskiĝis sur ia kulturkampo aŭ survoje, ĝi estos senescepte nomata *Kapja* en la unua okazo, kaj *Kanĵila,* en la dua.

Ĉe la *Ba-Nanu,* la akuŝantino aranĝas sin en sia propra hejmo kaj, nur leviĝinte, iras en la domon de siaj gepatroj dum kelkaj tagoj. Ŝi tiam ricevas, kiel donacon de ili, unu porkon aŭ kapridon. Nenia ceremonio estas farata pro la bapto. La infano ricevas nomon laŭ plaĉo de la gepatroj, escepte tiam, kiam la naskiĝo koincidis kun ia rememorinda por la tradicioj de la familio aŭ por la historio de la "libata" okazintaĵo.

La indiĝenoj el *Amboim* post la naskiĝo de la infano, praktikas agon sufiĉe interesan ne nur pro tio, ke ĝi ne troviĝas inter la moraro de aliaj gentoj, sed ankaŭ tial, ĉar ĝi havas ian superstiĉan devenon; kelkajn tagojn post la akuŝo, la edzo, klopodinte pri la karesoj de la edzino, kuntiriĝas en la momento de la genera spasmo kaj ricevas la spermon en ĉifoneton. La "kimbanda"¹) aldonas en ĝin iajn pulvorojn kun miriga efiko, kaj la fetiĉa ĉifono estas ligata al la zono de l' infano, kiu tiam povas foriri surstraten ŝirmita kontraŭ la aero aŭ misrigardoj. La patro mem baptas la infanon donante al ĝi nomon de parenco.

Tiuj el *Kibala* estas pli ĝojaj. Tuj kiam la naskodoloroj aperas al virino, ties "kubata" pleniĝas per ina ĉeestantaro, kiu laŭte elmontras sian ĝojon pro la okazaĵo. Kelktagojn poste, la patro elektas por la infano nomon de praulo kaj, kiam unu monato pasis, ĉiuj konatuloj estas invitataj por festeno, dum kiu ili manĝas "funĵi"n kun viando aŭ fiŝo kaj drinkegas "garapa"n (biero) el maizo. La festeno finiĝas per bruega "batuk"²) daŭranta ĝis plena laciĝo.

Inter la *Libolu* la infano naskiĝas, ĉu en la patrina aŭ patrinava domo kun ĉeestantaro de amikinoj kaj najbarinoj, krom la akuŝistino. Kaj samkiel en diversaj Pacifikaj insuloj, ili uzas la fumon de sekigitaj herboj por stimuli la kuntiriĝojn de la akuŝantino. Tuj kiam la infano aŭdigas la unuajn ekkriojn, ĝi ricevas nomon; se ĝi estas la unua filo, ĝia nomo estos tiu de la persono, kiu alportis la proedziĝan donacaĵon, en la ceteraj okazoj ĝi ricevas nomon ĉu de la gepatroj, ĉu de ia familiano. Sed utilas klarigi pri tio, ke en *Libolu* kaj ĉie ajn, la indiĝenoj ŝanĝas sian nomon samkiel oni ŝanĝas ĉemizon. Ofte ili posedas tri aŭ pli diversajn nomojn, kiuj montris la neceson, en kiu ili troviĝis, ŝirmiĝi kontraŭ la postuloj de la "civilizigo".

En *Loanda,* la ĉefurbo de Angola, kie koncentriĝas plej diversaj indiĝenaj gentoj, la moroj estas konsekvence, tre malsamaj, sed laŭ la plej ofta uzado, la akuŝantino, tuj post naskiĝo de la infano, estas volenevole sidigita en granda ujo plena per preskaŭ bolanta akvo, post kio la akuŝistino (ĝenerale ankaŭ maljunulino) metas sub ŝia lumboparto ujon enhavantan brulantan karbon. Per ĉi-du dolorigaj operacioj, el kiuj la lasta ofte kaŭzas gravajn brulvundojn, ili celas elirigi ĉiujn nasko-sangaĵojn kaj rapide pretigi la akuŝintinon por tuja laborkapablo. Ja, unu aŭ du tagojn post la akuŝiĝo, la indiĝenino reprenas sian taglaboradon, tre ofte el la plej pezaj, portanta sian idon sur la subdorso. Pro la influoj de la "civilizigo" la bapto okazas en la preĝejoj kaj estas preskaŭ ĉiam sekvata de granda festeno, kiu finiĝas per speciala ĝislaciga dancado („gaeta"), kies instigilo ĝenerale estas harmoniumo (akordeono). (Daŭrigota).

¹) Indiĝena persorĉaja kuracisto.
²) Indiĝena dancado tre movoplena.

Scienca kroniko

Sub tiu ĉi rubriko estus tre signifa ricevi materialon el ĉiuj partoj de l' mondo. *Red.*

El mezo de Azio

1. En regiono de *Irkutsk* ekzistas grandaj provizoj da bruna polurebla karbo simila al la skotlanda *(boghed).* La provizoj egalas ĉirkaŭ 300 bilionoj (milmilionoj) da kilogramoj. Ĵus faritaj kemiaj esploroj montris eksterordinare altan kvaliton de ĉi minkarbo. Cent kilogramoj da ĝi post distilado donas 40 kilogramojn da mineraloleoj — benzino, lampoleo, motoroleo, ŝmiroleo, parafino ktp.

Do kvalito de ĉi karbo kvinfoje superas tiun de eŭropaj brunkarboj utiligataj en mineralolea industrio. La karbon oni nomas *sibiria nafto.* Rezultatoj de l' esploroj estos publikigitaj en aparta broŝuro.

2. La reto de meteorologiejoj en Sibirio vastiĝas. Ĵus Irkutskon revenis post longa scienca vojaĝo meteorologo *Ovĉinnikov,* kiu fondis du novajn staciojn en urboj *Olokminsk* (Jakutio) kaj *Bulun* (Burjatio).

3. En Omska gubernio ĉe vilaĝo *Sergievo* (apud rivero *Omj*) estas trovita sidejo de prahistoria homo de bronza periodo. La trovaĵoj (iloj en osto, pecoj de argilvazoj, bronzaĵoj) estas liveritaj en Muzeon de Omsk.

4. Apud stacio *Sludjanko* ĉe suda bordo de la lago *Bajkal* troviĝas riĉegaj minejoj de glimo, kiu havas tre altan kvaliton. Uzeblaj folioj de la glimo (diafana foliebla ŝtono) atingas 4 kvadr. metrojn. La esploroj de instituto de mineralogio vekas grandan intereson de iuj nekonataj personoj. 5. oktobro en minejo n-ro 2 de l' instituto estas mortigita gardisto kaj ŝtelita parto de liverita glimo.

5. Ĵus revenis el Jakutio grupo de esploristoj de Scienca Akademio gvidata de profesoro Grigorjev. La grupo dum 6 monatoj faris zoologian, botanikan, geologian esplorojn en regiono de *Aldan,* kiu estas fama pro riĉegaj novaj ortrovejoj. Estas kolektita riĉega scienca materialo, kiun oni intencas sistemigi en Leningrad tuj post la veno.

6. En fino de septembro en Verĥne-Udinsk (ĉefurbo de Burjatio ĉe orienta bordo de Bajkal) unu virino 28-jara naskis

4 infanojn (3 knabinoj kaj 1 knabo). La unua naskiĝis knabo 18. septembro en 7. vespere. Sekvantan tagon nokte (en la 2.) naskiĝis knabino. Dudekan de sept. tage (en la dua) naskiĝis du knabinoj. La knabo pezas 2,8 kilogramojn, la knabinoj 2—2,4 kilogramojn. Ĉiuj infanoj estas vivaj kaj sanaj. Laŭ certigoj de ginekologoj la fenomeno estas tre rara (malofta), ĉar okazas nur unu inter 5000 naskiĝoj.

7. Sekvantan jaron en Sibirio oni intencas apliki grandskale aerfotografion por fari planojn de grandaj koloniigendaj spacoj en nordorienta regiono de Ural kaj en *Vasjuganpraarbaro* (inter Tobolska kaj Omska gub.) Aerfotografotaj estas ĉirkaŭ 30 000 kv. kilometroj. Kiel bazo por la laboro servos geodezie difinita triangularo inter bone videblaj el aeroplano surteraj objektoj (preĝejoj, turoj, domoj, lagetoj ktp.). La fotobildoj faritaj el aeroplano kaj skale konformitaj al la triangularo donos detalan kaj perfektan planon de l' spacoj esplorotaj. Ĉiu planita kv. kilometro kostos nur po 18—25 kop. Geodezia ĉefoficejo de SSSR intencas utiligi spertojn de l' entrepreno por siaj ĝeneralaj kartlaboroj. *Maksim Krjukov.*

Nova minaĵo

Labuncov — kunlaboranto de Rusuja Mineralogia Muzeo, — eltrovis en Okcidenta bordregiono ĉe Blanka Maro tre altvaloran novan minaĵon "urana rezina minaĵo". Ĝis nun en Rusujo oni ne sciis pri trovejoj de uranaj minaĵoj, kiuj plejparte estis ellaboritaj en Kongo. Specimenoj de novtrovita mineralo estis montritaj en Mineralogia Muzeo dum la festado pri 200-jara jubileo de Akademio de Sciencoj.

Elrusigis *S. Bojev*
Poltorack

Helpos nur lingvo internacia

Fine eĉ scienculoj ekparolis . . . skribas en Moskva "Pravda" prof. Vulf okaze de la 200jara jubileo de l' Akademio de Sciencoj en Sovet-Unio:

— "Tragedio de nia scienco estas nekonateco de rusa lingvo por alilandanoj. Niaj sciencaj laboroj, verkitaj ruslingve estas absolute neatingeblaj por niaj alilandaj kolegoj. Mallongaj resumoj en fremda lingvo ne povas multe helpi.

Por rusa scienculo restas ellerni iun fremdan lingvon tiom, ke li povu verki siajn artikolojn kaj librojn. Tiam liaj verkoj fariĝas havaĵo de l' tutmonda scienca kritiko.

Sed ofte okazas male, kaj lastatempe ĝi estas ĉiam pli kaj pli ofta. Alilandaj scienculoj trafas grandan embarason, ne povante, pro la nescio de rusa lingvo konatiĝi kun grandaj sciencaj atingaĵoj, publikigitaj en rusaj libroj kaj gazetoj.

Mi permesos al mi priskribi kelkajn faktojn el persona sperto. En 1890 mi laboris en Munĥena universitato kaj miaj k-doj laŭ specialeco demandadis min kun granda intereso pri konataj al ili nur laŭ famo verkoj de jam nun mortinta E. S. Fjodorov, fariĝinta poste ano de Rusia kaj Bavaria Akademioj de l' sciencoj. Siajn laborojn Fjodorov publikigis tiam ruslingve. Mi promesis verki detalajn referatojn pri liaj laboroj germanlingve, kiuj, efektive, baldaŭ estis presitaj.

Ĉi tiuj referatoj elvokis en eksterlando grandan intereson al laboroj de Fjodorov.

Fjodorov ellernis germanan lingvon kaj komencis verki en ĝi pri siaj esploroj.

Lia gloro komencis rapide kreski. Siajn unuajn laborojn Fjodorov ne publikigis en fremda lingvo. Ili diskoniĝis per miaj referatoj, kiuj ne povas, tamen, anstataŭi la laborojn mem. Kaj jen, vizitinte dum la sama pasinta vintro Parizon, mi el konversacio kun prof. Ŝ. Mogen, eminenta juna franca scienculo, eksciis, ke li speciale ellernis rusan lingvon por tralegi la unuajn verkojn de Fjodorov.

Jen! Ni ne intencas ĉi tie agiti prof. Vulf'on pri Esperanto.

Niaj SAT-anoj, scienculoj kaj sciencemaj, devas prizorgi la demandon pri sciencaj verkoj kaj precipe tradukoj esperanten de la plej gravaj sciencaj laboroj, por ke niaj proletaj scienculoj, kiuj jam venas, ne estu devigataj perdi multekostajn tempon kaj forton por ellernado de fremdaj lingvoj.

La proletaj scienculoj elektos la plej perfektan, saĝan kaj facilan vojon: ili utiligos internacian lingvon.

B. Egers (4544).

"Heroldo" de neŭtrala esperanta movado

Ĝis nun multaj el ni sincere opiniis, ke la agadkampo de vera ortodoksa neŭtralulo estas sufiĉe malvasta: filatelio, interŝanĝo de ilustritaj poŝtkartoj per "treege seriozaj temoj", de papermono jen la limoj de permeseblaj internaciaj interesoj, ekster kiuj jam komenciĝas tiom timiga partianeco.

Ni estas devigataj kun honto konfesi, ke ni eraris.

Montriĝas, ke neŭtralecaj temoj estas tiel multenombraj, kaj ilia aktualeco estas tiom nevenkebla, ke semajna gazeto ne povas jam kontentigi la legantojn.

Esperanto "triumfonta" jam estas arĥaismo.

Urĝas heroldi pri gravegaj problemoj, kiuj tiel emociigas la asocion en niaj maltrankvilaj tagoj.

Ĵus estas finita la internacia enketo pri "blueco de ĉielo" (Heroldo n-o 37 [265]). Solvata ĝi estis laŭ plej demokrata principo. Plej eminentaj "Samideanoj" same kiel simplaj mortuloj donis sian opinion. Ni ne povas diri, ke tiu-ĉi viv- kaj interesplena problemo estis plene solvita.

Sed la vivo ne atendas. Aliaj neprokrasteblaj problemoj estas starigendaj ekz.: "Ĉu la Universo estas senfina", "Kiel la rizo venis *sur* la mondon" (ne pensu, leganto, ke temas pri milita invado), "Kiom da malvarmo bestoj povas elporti", "Trezoroj de reĝo Davido", "La sankta skarabo de Egiptujo" ktp. Se unu numero*) starigas tiom da problemoj, kies aktualeco ja estas ekster iaj duboj, ĉu ni kuraĝos nei la bezonon de duonsemajna gazeto? Male: kial ĝi ne fariĝu ĉiutaga? Niaflanke ni volonte kompletigus la enhavon kaj proponus ankoraŭ kelkajn temojn por internaciaj enketoj kaj artikoloj, ekz.: "Kial la meleagroj timas la ruĝan koloron?" "Ĉu la stulteco de homoj estas senfina kaj kiel ĝi sur ili venis?" "Kiom da sensencaĵoj la esperantista leganto kapablas elporti?"

Kaj multajn aliajn. Ni eĉ kuraĝas pensi, ke tiuj temoj, kiel sufiĉe konkretaj pli multe plaĉos al legantaro.

Kaj oni post tio diru, ke neŭtraluloj ne havas pri kio skribi! *F. kaj L.*

Kiel iĝi riĉa

De Gustavus Myers

Ĉu la granda riĉaĵo de la amerika milionulo *Astor* amasiĝis pro la praktikado de tiu triunuo de kvalitoj — industrio, ŝparemo kaj kapableco?

La *Astor*-familio posedas vastajn areojn de tero kaj konstruaĵojn en Nov- Jorko kaj aliloke.

La palacoj, en kiuj ili luksege loĝas, konsistas el insuloj de konstruaĵoj kaj tute proksime inter 3000 ĝis 6000 malriĉaj homoj estas pakitaj en unu sola domaro. La Astoroj estas ankaŭ grandaj akciuloj en multaj kapitalistaj "entreprenoj". Ilia ĉiujara rento estas ĉirkaŭ kvincentoble pli granda ol la salajro pagata al la prezidanto de Usono.

Vivante parazite senokupe kaj lukse, ilia rento pli ol egalas tiun, kiun 41 000 laboristoj, pagataj meze 600 dolaroj ĉiujare, ricevas por unu jaro de senĉesa laborego.

La historio rakontita en registaraj kaj juĝejaj dokumentoj pri la origino de tiu ĉi riĉaĵo estas tre malsama je la senŝanĝaj rakontoj de la laŭduloj.

La fondinto de la Astor-riĉaĵo estis John Jacob Astor, germana enmigrinto kiu aliris Usonon en 1783 kun kvin funtoj sterlingaj. Li mortis en 1848 postlasanta riĉaĵon de 20 000 000 dolaroj — tiam la plej granda en Ameriko. Kiel li havigis ĝin?

La registroj montras, ke li iĝis komercisto de peltoj kaj trompis la indianojn post kiam li ebriigis ilin. Post kiam li organizis la Amerikan Peltan Kompanion en 1810, li ŝipe transportis grandegajn kvantojn da viskio inter la indianaj triboj. Vendi alkoholaĵon al indiano estis grava krimo kontraŭleĝa. Sed Astor aĉetis imunuecon subaĉetante publikajn oficistojn. Unufoje (en 1817) li donis al Lewis Cass subaĉeton de 35 000 dolaroj. Kiu estis Cass? La guberniestro de "Michigan" teritorio, kie troviĝis unu el la ĉefaj negocejoj de Astor, kaj li (Cass)

*) N-o 68 de 2. sept. 1925.

poste iĝis Sekretario de Milito, la sama oficisto kiu tiam havis ĉefan aŭtoritaton super indianaj aferoj.

Astor postulis de la indianoj de 25 ĝis 50 dolaroj por kvar kaj duono litroj da viskio, pagebla per peltoj. La registroj montras, ke al la indianoj neniam estis permesate komerci kiam ili estis malebriaj. Diboĉiginte ilin, Astor profitus el ili plue per interŝanĝo de malkaraj komercaĵoj, je grandegaj prezoj, por iliaj peltoj. Li pagigis, ekzemple, unu dolaron kaj duonon por unu latuna fingringo; dek ok dolarojn por unu funto da tabako; tridek dolarojn por dekunu-dolara pafilo; kvar dolarojn por pulvo kiu kostis al li dudek cendojn, k. t. p. (100 cendoj = unu dolaro = 4×16 ŝilingoj = 5 frankoj antaŭ milito).

Diboĉigitaj, trompitaj, la indianoj kun grandegaj ŝuldoj kaj nun senhejmaj, devis sin turni al la sola rimedo por protekti sin. Ili ne rajtis procesi en juĝejo, ĉu civila ĉu krima, ĉar estis konsiderata kontraŭleĝe akcepti la ateston de indiano. Sekve ili devis sin turni al primitiva forto, ili ofte leviĝis por venĝi, kaj masbuĉis blankulojn kaj mortigis la komercistojn de Astor. Tiam, vice, la registaro rapide sendis soldataron kaj mortpafis ilin kaj bruligis iliajn vilaĝojn.

Estis longa ĉapitro de terurajoj. Sed Astor estis sendanĝera en Nov- Jorko, entiranta siajn milionojn. Vere, pli ol cent kvindek blankaj komercistoj estis mortigataj de indianoj, sed la riĉaĵo de Astor daŭris pligrandiĝi per mortigo kaj masbuĉo. Li estis ruzema kapitalisto kiu dungis virojn por fari sian filaboron kaj spiti morton, dum li estis sendanĝera pli ol mil mejlojn for kaj rikoltis la tutan profiton. La registaraj registroj montras, ke li ricevis renton de 500000 dolaroj ĉiujare de tiu ĉi negocaĉo — grandega sumo en tiu epoko.

Tiel li havigis al si la monon por investi en Nov- Jorka tero kaj en bankoj kaj aliaj kapitaloj. Sed samtempe kiam li estis diboĉiganta kaj trompiganta la indianajn tribojn en okcidento, li estis koruptanta oficistojn en la urbo Nov- Jorko por ke ili cedu al li teron. Tiu ĉi tero estis parto de la granda areo tiutempe posedata de la municipalo de urbo Nov- Jorko. Ĝia valoro tiam ne estis granda, kvankam estis ĝia *potenca* valoro. Nuntempe ĝi valoras centojn da milionoj da dolaroj. La proksimaj idaroj de Astor daŭrigis la procedon. Ili subaĉetis Ordinarajn Konsilantarojn kaj Leĝfarantojn, evitis impostojn kaj rikoltis milionojn per lupagoj, ne nur per komercaj konstruaĵoj, sed ankaŭ per ĉambraĉoj maltaŭgaj por homa loĝado. Dum generacio post generacio, milionoj da homoj en Nov- Jorko estas laborintaj por pligrandigi la valoron de la Astoraj realaj havaĵoj, sen la neceso, ke la Astoroj movu eĉ unu fingron.

Malpli ol unu jarcento post kiam John Jacob Astor estis direktanta daŭran diboĉigadon, trompadon, subaĉetadon kaj mortigadon, liaj idaroj havas serion de reĝaj palacoj kaj sidas arogantaj kaj potencaj kiel fieregaj aristokratoj. Unu el la Astoroj, William Waldorf Astor, montris sian malestimon por la lando de kie lia riĉaĵo venas, rezignanta Amerikan civitanecon kaj fariĝinta Brita regato.

Trad. el la angla lingvo *J. T. Winter*

Kiel ni vivis kaj laboris

(Pri Ĉita'a [12. sektoro] SAT-grupo).

Neniam oni vidis en "Sennaciulo" detalan kaj koncizan priskribon de laboro de iu SAT-grupo. Tamen mi opinias, ke ĉi-priskribo estus grava. Ĝi sciigas, akiritajn de iu aparta grupo, spertojn al la tuta SAT-anio.

Mi deziras komenci ĉi-aferon, priskribante nian SAT-grupon en Ĉita (12. sektoro) kuŝanta en malproksima Siberio, flanke de centroj de l' internacia vivo.

Nia SAT-grupo estas tre juna, tamen ĝi funkciis tre vigle kaj vivoplene. Eble pro tio, ke en ĝi kolektiĝis plejparte entuziasmaj gejunuloj, plenigintaj nian laboron per intereso, vigleco kaj kunfratiĝo.

Nia SAT-grupo konsistis el 4 malnovaj SAT-anoj, kaj el 4 novaj, el kiu estis 2 junulinoj. Ĉiuj ili aktive laboris en lernanta esp.-organizaĵo.

Unuan fojon ni kolektiĝis la 8. marto nunjare. Atente ni aŭskultis historian skizon de l' "Ĉita'a SAT-movado", faritan de la plej "malnova" SAT-ano k-do B. Ni decidis kolektiĝi ĉiudimanĉe laŭvice ĉe ĉiu k-do, skribi ĉiufoje "taglibron", fini ĉiun kunvenon per "Internacio". Ni elektis sekretariinon-k-dinon M.

Pasis nun jam 28 dimanĉoj, kaj nur dum 2 el ili — niaj kunvenoj ne okazis. Dum tiuj 26 "dimanĉoj" ni ĉerpis al ni grandegan sperton, klaran komprenon de Sennaciismo, kaj bonan scion de la lingvo, ĉar ni parolis inter ni *nur* esperantlingve.

Post preskaŭ ĉiu kunveno ni daŭre kantadis revoluciajn kantojn el la "Prolet. Kantaro" (unuavice: "al la Sennaciularo"), kio certe nin fortege kunfandis kaj edukis al revolucia, sennacieca ardo.

Multo okazis dum tiuj "kunsidoj". Praktikaj decidoj, studraportoj, ardaj, teoriaj diskutoj, bataletoj, iniciatoj, interŝanĝoj de opinioj, petoloj, kantadoj kaj tetrinkadoj.

Mi prezentu la plej gravan:

Dum 3 kunvenoj komencitaj de k-dino Z., ni arde diskutegis pri tio: "Ĉu SAT povas esti politika organizaĵo? Pri unuecfronto en SAT ktp."

La kvar, pli malpli trankvilajn, kunsidojn ni dediĉis al la serioza studado de la statuto de SAT.

Unufoje ni diskutaĉis pri "sektorsistemo", kaj 2 k-doj (mi, kaj k-do A.) proponis siajn projektojn de sektorsistemo.

Ardege ni unufoje diskutis pri "la artikolo 2. de la statuto", finfine aprobinte la tekston, akceptitan ĉe la IV. kongreso.

Du kunsidojn ni dediĉis al pridiskuto kaj ellaboro de rezolucio pri "unuigo de per- kaj poresperanta laboro aŭ pri SAT-strukturo" kaj fine ni, rompinte miskomprenon, interkonsentiĝis aprobinte sennaciecan (sed ne internaciecan) konstruon de SAT.

Du sekvontajn kunsidojn ni studis "naciproblemon" kaj "problemon de sennaciiĝo de la mondo". El diskutoj naskiĝas vero, kaj efektive post la diskutoj ni ellaboris tute precizan, "klaskonscian" kaj sennaciecan rezolucion.

Treege multe ni havas "praktikan" dum niaj kunvenoj. Jen estas kelke da ekzemploj:

Necese estis, laŭ propono de E. K., prezenti kandidatojn, por elekto de "Direkta Komitato", kaj ni, post longa admonado de k-do B., fine elektis k-dojn B. kaj T., nun jam elektitajn per ĝenerala voĉdonado, kiel DK-ano kaj ekstra DK-ano.

Antaŭ la 1. majo, al k-do T. venis bela ideo, sendi unumajajn gratulojn al diverssektoraj lab. esp-istoj, kion ni entuziasme plenumis, sendinte poŝtkartojn al 8 urboj.

Je la 7. kunveno ni decidis organizi gubernian komitaton de SEU., kaj kvankam tio ne koncernis senpere al SAT, tamen ni dediĉis nian entuziasmon kaj fervorecon dum du semajnoj al tiu problemo, kaj fine ĝeneral-kunveno de SEU-anoj estis aranĝita, kaj gub. kom. estis elektita.

Estis ankoraŭ okazo, kiam ni indignite ellaboradis protestleteron al redakcio de l' loka gazeto, evitinta citadi la fonton ĉe bonvole presataj tradukoj el "Sennaciulo".

Longe ni ankaŭ aranĝadis nian grandegan kolektivan leteron sendotan al aliaj SAT-grupoj, kiu malfeliĉe, pro manko de mono (kutima manko! . . .), estis senditaj nur al tre malmultaj lokoj.

Krome estas ankoraŭ multaj aferoj, kiujn mi eĉ ne memoras. Multege ni laboris por SAT kaj por esperanto: Jen unu tradukas el "Sennaciulo", alia por ĝi, k-do B. gvidas multegajn esp.-kursojn, mi kun k-do T. kunligigas niajn organizaĵojn kun eksterlandaj, iu propagandas, iu raportas ktp.

Ni efektive fariĝis preskaŭ unu familio. Estis tia okazo: Unufoje k-dino Z. grave ekmalsanis, kaj ni trifoje seninterrompe havis kunsidojn ĉe ŝia hejmo, nur por ke ŝi povu partopreni ilin eĉ malsana, kaj tiuj kunsidoj estis plej "lirikaj" kaj intimaj.

Multfoje niajn kunsidojn vizitadis "gastoj", aliaj revoluciaj esperantistoj, atente kaj silente aŭskultintaj niajn "batalojn".

Sed ne longe nia grupo laboras plenkonsiste.

Sed tamen eĉ malmultiĝante ni ne ĉesis labori. Male, ni laboris pli kaj pli energie, kaj ni ne restis solaj, al ni venis jam novaj kaj junaj k-doj. Fine de la aŭgusto ni organizis el 8 novesataniĝontaj k-doj studrondeton, por studado de SAT kaj sennaciismo, kaj pliperfektiĝo en la esperanto-parolado. Kaj ni — malnovuloj — transdonas niajn spertojn kaj sciojn al ili. Nun ĉiudimanĉe matene kunsidas la nova rondeto, dum vespere kutime kunsidas la SAT-grupo.

Parto el nove sataniĝontoj jam nun aktive partoprenas nian praktikan SAT-

laboron. Ekz.: kun ili, ni sufiĉe bone partoprenis, t. n. "Internacian Infan-Semajnon" (30. aŭg.—6. sept.) kaj „Internacian Junulartagon" (la 6. sept.).

Nun venas aŭtuno, provizore forveturintaj satanoj, laborintaj somere por bono de esp-o en aliaj lokoj, iom post iom revenas Ĉiton. Baldaŭ, nia SAT-grupo pligrandiĝinta, pli sperta kaj scianta, denove ekbolos boligante ĉiujn grupanojn, kaj nian ĉirkaŭantan medion, per spirito de Sennaciismo.

Kaj por tiu laboro — ni pretas! Sed dume retrorigardinte nian estintan laboron, ni konstatas:

Eble, ke ni havas multegajn mankojn, komence ne sufiĉe bone varbis por SAT, ne plene plenumis la de ni deciditan, laboris ne sufiĉe serioze, — *sed tamen ni vigle vivis kaj laboris!*

Rezultoj jam estas vidataj. *K. Fade.*

Dekmilo da politikaj enkarcerigitoj en Italio

IRH — La lastaj monatoj de la furioza blanka teroro en la terorlandoj Bulgario, Hungario, Rumanio deflankigis la atenton publikan de la lando de Mussolini. Ja oni ankaŭ el la gazetoj italaj povas legi nur tre malmulte pri la veraj cirkonstancoj, ĉar la neoficiala cenzuro de la faŝistoj, kiu lojale estas aplikata, ne lasas tragliti iun ajn verecan priskribon. El la raportoj de la itala ruĝa helpo ni ĉerpas tre teruran bildon de la faŝista reĝimo. El tiuj raportoj ni vidas, ke la nombro de la arestitaj revoluciaj laboristoj en Italio neniam estas malpli ol dekmil. En la monato julio estis 8950 arestitaj laboristoj, en aŭgusto 9450, kaj en septembro jam 10131, kvankam la "granda" amnestio liberigis 1506 politikajn arestitojn. Konsiderante la statistikon oni vidas, ke en la sama tempo, kiam sub la aplaŭdo de la burĝa gazetaro 1606 laboristoj liberiĝis, preskaŭ dudekmil (1954) laboristoj estis enkarcerigataj. En la monato julio estis la nombro de la liberigitoj 380, tiu de la enkarcerigitoj 934, fine de septembro liberiĝis 957, kaj 2275 oni arestis!

≡ KRONIKO ≡

Britio

London. BLES sendis al 36 anglalingvaj sindikataj gazetoj poresperantan artikolon "Pli grandaj mondoj". 30 lab. internacioj ricevis personan alvokan leteron, pri la lingvo. Diskuto en "Lansbury's Labour Weekly" rezulte de artikolo de Star. — K-do A. B. Swales (Eks-prezidanto de la Brita Sindikataro, ano de Ekzekutivo de Maŝinfarist-Sindikato [AEU] kaj de Brit-Sindikataro) kaj D-rino Marion Phillips (organizistino de virinfako en Laborist-Partio) lernas Esperanton. K-do H. H. Elvin (ĉefsekretario de la Komiz-Sindikato Brita [NUC]) aniĝis al Brita Ligo de Esperantist-Socialistoj.

Francio

Nancy. La tiea esp.-lab.-grupo organizis konferencon propagandan okaze de malfermo de novaj kursoj. Duonsukceson ni atingis. 11 lernantoj enskribiĝis por la kurso. Parolis k-do de FEO kaj la kunveno estis prezidata de k-do Humbert. Sekretario de Unuiĝo de sindikatoj en Meurthe et Moselle (franca departemento en Lorraine). Cetere, la tieaj lab.-organizaĵoj bone helpos nian propagandon kaj 8 sindikatoj estas subtenantaj membroj de nia grupo. Ankaŭ funkcias en Nancy kurso por progresantoj. Ni devas noti, ke tiuj rezultoj estas ja kontentigaj, ĉar Nancy estas tre reakcia urbo. Ni sciigas la tutmondan satanaron, ke ĉiuj sciigoj pri laboristaj aferoj koncernantaj la orientan regionon de Francio (ĉefe en Lorraine) estu sendataj al la Sindikata Unuiĝo en Meurthe et Moselle. Pere de nia tiea grupo. Skribu al Esp.-lab.-grupo, Maison du Peuple, Nancy, Francio.

Latvio

Riga. Kvankam la Riga'a t. n. "neŭtrala" Esperanto Societo funkcias jam multe da jaroj, tamen Esperanto ĉe ni ne montras progresemon, tute kontraŭe ĝi emas malantaŭeniĝi, malgraŭ la "pionireco" kaj "fervoreco" de la "samideanoj". Tamen kion ne kapablas burĝoj, kapablos laboristoj. Ĝojiga fakto estas, ke la laboristaro, precipe la laborista junularo, kun granda intereso ekrilatiĝis al Esperanto, kiu ŝajne nun trovis pli fruktodonan kaj ĝustan grundon. Hieraŭ la 3. novembro la junulara sekcio de latvia social-demokr. partio en Riga aranĝis lekcion pri "Esperanto kaj ĝia signifo por la laboristaro". Prelegis nia k-do A. Krastin. Kvankam ĉeestis nur 20 personoj, tamen ĉiuj atente aŭskultis la preskaŭ 2 horan paroladon kaj mirigitaj pri la grandeco de l' movado forirante preskaŭ ĉiuj certigis sian aliĝon al la kurso en plej proksima tempo estigota ĉe popola (laborista) altlernejo, kiel fako de l' popolmastruma kaj jura fakultato. Instruos ankaŭ nia supre menciita k-do. *Kr.*

Sovet-Unio.

Dolinskaja. La 19.10. en la loka teatro okazis la solena malfermo de esp.-kurso.

En ĉi tiuj pezaj tagoj . . .

Bildoj el la terorlandoj

de *A. Kollosov*

. . . Ne, ni havas nek nombrojn nek vortojn, per kiuj ni povus priskribi la heroan batalon de la ruĝa junularo.

Amasiĝas la dokumentoj, — ĉiu el tiuj folioj estas atesto ne refutebla kaj ne ekskuebla.

Unu el tiuj folioj diras . . .

Sur la urbplaco en *Vrac* (Wraz-Zankovlando) rebruegas la martelbatoj, — ciganoj el la proksima tendaro konstruas pendigilojn. En la turmentĉambroj de tiu ĉi urbo skribas junaj knabinoj leteron "al ĉiuj proksimaj kaj malproksimaj fratoj". Ili skribas, ke ilin matene atingos la morto, kaj ke ili forlasos la vivon „plene kuraĝa kaj kredante al la venko de la laborista afero". Kaj ili petas la plue vivantojn nur pri jeno: "Ne timu la morton, ĉar la vivo katenita en ĉenoj estas ne pli terura ol la morto" . . . tolerebla.

El la lando de la ŝlaĥzizoj (Polio)

. . . En la Sejm (parlamento) interpelacio pri la sekvanta prunto. *Doszinski* parolas longe kaj verve pri konfido kaj pri la principo de "finiĝinta" demokratio. Sed ekstere sur la strato polictrupoj entreprenas atakon per venengaso kontraŭ domo, en kiu redutis sin junaj proletaj batalantoj . . .

La saman tagon agentoj de la „Devenzivo" rapidegis en la ĉelon de la 17jara Beĥer:

— Nomu al ni la komitatanojn . . . aŭ ni dishakas vin en pecetoj!

Beĥer rifuzas ion diri; li ne estas perfidulo . . . La sekvantan tagon la maljuna patrino fikse rigardas la vizaĝon kvazaŭ morte rigidiĝintan de la filo. Ŝi levas la kapon, genuas antaŭ la policistoj:

Montru al mi mian filon. Tiu li ne estas . . .

* * *

Denove Bulgario

. . . Ĉe la arbara bordo staras gardposteno. *Krum Deltschen,* membro de la komjunularo, paŝas tra la nokto, haltas antaŭ la posteno.

Starigas sin antaŭ li kaj montras al li sian sangan, al masko rigide tiritan vizaĝon. Trans la masko fluetas el la dekstra okultruo muka fluaĵo. Elfluis la interno de lia okulo.

La juna viro staris silente antaŭ la posteno. Lia dekstra okulo observas la brilantan stelpluvon de la nokto. Li staras kaj silentas. Poste li ekparolas, apenaŭ aŭdebla, lia mano dume palpas tra la aero kvazaŭ intencante kapti nevideblaĵon kaj netrapenetraĵon.

De la longdaŭra turmentado freneziĝinta, li flustras rapidege al la gardposteno:

— Nenian inkon. Nenion. Tute nenion.

Post kiam li diris tion, li volis foriri. Sed trifoje trafita de plumbo el la policpafilo, li rulas kvazaŭ ŝtono en la kavon.

La netransvidebla tombejo de Bulgario riĉiĝis je unu tombo.

Estis finlegita la raporto pri "Laborista Esperantismo" kaj aliaj. Ĉeestis 150 p. Por kurso enskribiĝis proksimume 30 p., precipe la gekomsomolanoj. La kursanoj estas dividitaj je du grupoj. — En la ejo de la teatro estis elpendigitaj novaj afiŝoj pri esperanto kaj malfermita ĉiama esp. ekspozicio, akompanata de klarigaj tekstoj en la rusa lingvo. Intereso por Esp. kreskas. — La 20. 10. okazis reelektoj de regiona komitato de profunuiĝo "Sovetlaboranto". La nove elektitan komitaton eniris 5 k-doj, el kiuj 4 estas anoj de Sovetlanda Esp. Unuiĝo.

Ivanovo - Voznesensk. Gubernia fako de SEU, en kiu partoprenas ankaŭ 5 SAT-anoj, fondiĝinta la 15. julio, disvolvis larĝan propagandon de la lingvo kaj ĝia signifo por la proletaro. Tiucele estis aranĝitaj 6 lekcioj kaj raportoj, inter ili unu — perradia; de 1. ĝis 15. oktobro estis proklamita esp. semajno, kiam en loka gazeto preskaŭ ĉiutage aperadis jen artikoloj, jen anoncoj. Entute dum tri monatoj aperis 12 artik., 10 anonc. kaj 6 devizoj. Fondiĝis 5 kursoj en diversaj regionoj. Esperanto fariĝas populara.

Transbajkalio. Tre malproksime de ia ajn kultura loko, ne malproksime de tutmondfama lago Bajkalo staras malgranda urbeto kun la nomo Petrovskij-Zavod. Loĝantaro en ĝi estas ne pli ol ok mil. Ĝenerale, nia urbeto estas same kiel simpla vilaĝo. Klimato ĉe ni estas malvarma, ĉar ni havas vintron preskaŭ dum kvin monatoj, nome: novembro, decembro, januaro, februaro kaj marto. Printempo daŭras ĉe ni plej parte dum du monatoj: aprilo kaj majo. Aŭtuno estas ankaŭ du monatojn: septembro kaj oktobro, kaj somero havas nur tri monatojn, nome: junio, julio kaj aŭgusto.

Sed, se ni ne havas pli bonan klimaton, ĉe ni estas pli bela naturo, kaj preskaŭ ĉiuj ĉirkaŭantaj nin montoj havas riĉaĵojn.

Unue nin ĉirkaŭas montaro, kaj due arbaro. Oni povas ĉiutage vidi belecojn de nia rigora klimato.

Malgraŭ tio, ke ni havas pli malvarmon ol ion alian, loĝantoj nun vivas pli bone, ol ie ajn, kaj speciale post oktobra revolucio, ĉar ĉe ili nun nenio mankas. Salajro sufiĉas. Vivkondiĉoj estas ankaŭ plibonigitaj.

En tiu malgranda urbeto somere de l' kurantjaro alveturis el urbo Ĉito, por praktikaj laboroj ĉe minejo, kiu estas de urbo ne malproksima, studento kun nomo k-do Trofimov (Esperantisto-SAT-ano 3404). Unue li trovis ĉe ni malnovan Esperantiston k-don Tomilov, ekkonatiĝis kun li, kaj kiel nova loĝanto, certe, laŭ invito de k-do Tomilov, enlokiĝis en lia ĉambraro.

Post unumonata, komuna laboro pri organizo rondeton esperantistan kaj kursojn, ankoraŭ kune kun kelkaj k-doj, laboro estis komencita.

Estis kunvokita organizkunveno. Ĉeestis 12 k-doj. Estas elektita Bjuro de rondeto, kaj gvidanto de kursoj. Gvidanto de kursoj estas k-do Tomilov. La 7. sept. kursoj estis malfermitaj.

Sekve nur dank' al k-do Trofimov ĉe ni renoviĝis Esperanto. Dume, jam estis 8 lecionoj. Aliĝis al rondeto 27 k-doj. Inter ili ankaŭ estas unu dekunujara knabo, kaj kvar fraŭlinoj. Aliĝis al SEU (Soveta Esperantista Unuiĝo) — 16 gek-doj. SAT-aniĝis 2 k-doj.

(Kial ne ankaŭ 16 al SAT? Red.)

Grave, estas tia okazo, ke en nombro de geaŭskultantoj estas "Komsomolanoj".

Post tiu tempo mallonga, oni povas rimarki, ke ankoraŭ ekinteresiĝis por lingvo internacia Esperanto tre multaj gek-doj. Rondeto estas nomita "Komenco".

Niaj plej kapablaj k-doj jam povas komenci korespondadon kun samaj gelernantoj el aliaj landoj.

Por entuziasmigi ilin, pligrandigi intereson, rilate al nia kara lingvo, ankaŭ por praktikado, skribu alilandaj gek-doj al niaj sovetaj k-doj Transbajkalianoj, ĉar per tio, ni ĉiuj nur povas doni utilon.

Tver. 28. 10. estas malfermitaj la ŝtataj kursoj de Esperanto en urbo Tver, Sovet-Unio. Oficiala ŝtata instruado de E. vekis grandan intereson ĉe ne nur Tvera laboristaro sed ankaŭ ĉe loĝantaro de aliaj sovetaj urboj, laŭ la ricevataj de kursoj informoj. Tveraj ŝtataj kursoj, nova granda venko de Esp. en Sovet-Unio, nova paŝo de Soveta Registaro renkonten al esperanta movado. — Kursoj estas organizitaj samrajte al profesiaj teknikumoj kaj aliaj ŝtataj specialaj lernejoj kaj havas ĉeftaskon prepari instruistojn de Esp. por sovetaj duagradaj lernejoj en Tver, por sekvonta lernjaro. Kursoj akceptis ĉirkaŭ 50 lernantojn (pagantajn kaj senpagajn, senditajn de profunuiĝoj) por elementa kaj supera grupo. Ĉe kursoj estas instruataj: Teorio kaj praktiko de E., historio de Esp., metodoj de E-propagando, sociaj sciencoj, politika ekonomio, soveta strukturo ktp. Kurso de ĉiu grupo daŭros 6 monatojn.

Kaj el Rumanio

Ĉifonita, duone malsata, kelkaj rumanaj kamparanoj, post sensukcesaj provoj trovi laboron en la urbo, revenas al la vilaĝo.

Kun falsita pasporto, vestita kiel vagisto, kun paketo sur la ŝultro, migras kun ili *Bojanŝu,* membro de la komjunularo. La sama Bojanŝu, kun la agentoj de la "Siguranca" jam serĉas la trian monaton.

En trinkejoj, gastejoj kaj en stacidomoj oni ne enlasas la nelibervolajn vagantojn, ili transnoktiĝas sur kampo.

Dumnokte apud la kuŝeja fajro atendante la avaran vespermanĝaĵon, aŭskultas la konsumiĝintaj malsataj kamparanoj, kies piedoj estas ŝvelintaj de longa migrado, la parolojn de Bojanŝu.

Sed la laboro de Bojanŝu, lia plej grava laboro, ne estas ĉi tie, — li serĉas la vilaĝan junularon.

Hodiaŭ li venas en la malriĉan vilaĝeton *Skareŝti* kaj almozpetas, por superruzi siajn atentemajn malamikojn. Dekduon da knaboj li jam trovis, ĉiuj junuloj, al kiuj li plene povis fidi.

Bojanŝu havas tre bonegan vidon, kiu neniam mistrafas. Mallaŭte li flustras al ili: "Hodiaŭ ĉe sunmalleviĝo, en la kavo, apud "la fonto de la martiro" . . .

. . . Ŝajnas, ke la vento kaj la steloj de tiu ĉi nokto havis delikatan aŭdon kaj longan langon. Hodiaŭ tagmeze venis fremdaj armitaj personoj en la vilaĝon, ĉie esploris, iris de domo al domo.

"Ni ricevis la certan sciigon, ke Bojanŝu antaŭhieraŭ estis ĉe vi. Eksteren kun li."

Ili iras kaj esploras, demandas la virinojn, minacas per mortpafado . . .

. . . Malfrunokte kolektiĝis grupo ĉe la tombejo.

. . . Se Bojanŝu iras al Budapeŝto, — li estas perdita. Ili kaptos lin. Devojiĝas li dekstren, — tiam li estas libera. Ni devas informi lin. Kie li nun povas esti? Ĉirkaŭ 30 kilometroj de ĉi tie, pli li certe ne estas. Se oni volas postiri lin, tiam nur estas eble per ĉevalo. Sed se oni rajdas, — tiam oni ne povas eviti la policistojn. Ili tuj demandos: De kie kaj kien, al kiu apartenas la ĉevalo kaj kial oni tiel rapidas dum la rikolta tempo . . . Tiam ĉevalo kaj rajdanto pereos.

"Tio povas esti", diris *Poplavski.* "Sed ni estas revoluciuloj kaj ne gvidantoj! Bojanŝu iras en la morton. Oni devas savi lin!" "Oni devas savi lin!" diris ĉiuj.

"Kiu?" demandis Poplavski.

"Ni lotu" diris unu.

"Kial loti! Ĉiu, kiun vi nomas, devas rajdi" diris aliaj.

"Ne, restas ĉe lotado" decidis Poplavski.

Estis dek folioj, kiujn li ŝiris de la proksima acero. Poste li deflankiĝis, fermis la okulojn, faris signon per ungo sur unu folio, metis ĉiujn foliojn en la ĉapon kaj diris:

"Laŭvice."

La folion kun la signo havis la 12jara Antoĉ en la manoj. Kiam la knabo ekkonis tion, li diris:

"Do mi estas tiu. Sed la ĉevalo?"

"Mi donas la ĉevalon" diris forte Timoŝenko, li ja estis memstara kamparano.

Kaj *Antoĉ,* la 12jarulo, svingis sin sur la ĉevalon. Li informis Bojanŝu, sed reen en la vilaĝon li ne venis. Reen rajdante pafis lin ĝendarmo embuske de sur la ĉevalo.

Oni kantis en la vilaĝo pri li:

„Lia sango ekflamos! Kamarado kun sunaj radioj en kaj . . .!"

Esperantigis *715.*

Sennacieca Asocio Tutmonda

Asocia Sidejo: 23 Rue Boyer, Paris-XX[e]
Adm. Sekretariejo: Lerchner, Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz — poŝtĉeka n-ro 6835

OFICIALA INFORMILO

Celo: *Utiligi praktike la internacian lingvon Esperanto, por la klasaj celoj de la laboristaro tutmonda (vidi la Statuton).*

Al niaj legantoj kaj kunlaborantoj!

La alvoko de EK. al la tuta SAT-anaro estis lokita sur la unua paĝo en la n-ro 4 de "Senn.". Ĝi certe estas legita kaj atingis sian celon, kion ni jam povas konstati. — Poste la Red.-Kom. aperigis alian en n-ro 5 sur dua paĝo, kiu verŝajne ne trovis saman atenton. Per ĝi ni intencas surpreni la reciprokan interkompreniĝadon, kontakton kun niaj legantoj kaj kunlaborantoj.

Ili kritiku kun objektivaj rigardoj nian gazeton, priparolu siajn opiniojn en la esp-grupoj kaj sendu poste la rezulton en formo de kolektiva respondo al la redakcio. Ankaŭ izoluloj kompreneble respondu.

Jenajn respondojn ni presigos en "Senn.", ili estos samtempe direktivoj por niaj kunlaborantoj. Al ĉi lastaj ni jam hodiaŭ diru, ke ili nepre ŝparu la vanan laboron, verki tro grandajn artikolojn. Tiuj ne estas legataj de la abonantoj, almenaŭ de tre malmultaj. Oni konsideru, ke nia gazeto aperas ĉiusemajne, ke oni povas prezenti en ĉiu n-ro malgrandan art. pri ia afero. Tiun la abonantoj legas prefere kaj certe. Sed art. ampleksantaj ĉiujn 8 paĝojn, (ni ricevis tiajn tre ofte) ili timas.

La gazeto devas esti tre varia kaj enhavi multajn aferojn, por ke ĝi estu interesa.

Do, estu indulgemaj kaj permesu paroli al ĉiu, lasante al li lokon en nia organo, ke estonte tiu informo "ne povas aperi pro manko de loko" estu evitebla.

Sendu multajn art., informojn, raportojn ktp. sed klopodu, ke ĉio estu kiel eble plej konciza.

Red.-Kom.

Kotizoj por 1926

Kamaradoj, estas rekomendinde, ke vi jam nun renovigu la membrokotizon por 1926 por ke la laboro dum jan. kaj febr. ne tro amasiĝu. Ankaŭ por la kompilo de la jarlibro estas pli bone, se la k-doj sufiĉe frue renovigis la kotizojn. La kotizmarkojn ni sendos kune kun la gazeto. Lasttempe ni dissendis nian novan prospekton, kiu estas bona propagandilo, kaj ni esperu, ke la membraro en la nova jarlibro duobliĝos. Ankaŭ la lastaj sukcesoj de esp. certe helpos por pli densigi niajn vicojn. Do, kuraĝe al la laboro!

Municio por SAT kaj ĝiaj organoj

Aŭstrio: Knourek-Wien, 1.— ŝil.; Ŝpoljariĉ-Wien, 1.— ŝil.; Wakonigg-Köflach, 1 ŝil.; Hejda-Wien, 2.— ŝil. **Britio:** Dierks-Glasgow, 22 penc. **Ĉekoslovakio:** Jakoube-V. Hamry, 1.— mk. g.; 1934, 20.— kr. ĉ. **Francio:** Memore je Währing, 40.— fr. fr.; 4161, 10.— fr. fr. **Germanio:** Bitzer-München, 3.— mk.; Dobeck-Falkenstein, 0.50 mk.; Thamm-Landeshut, 1.15 mk.; Haussner-Kehlheim, 0,50 mk.; Grünberg-Leipzig, 0.50 mk.; Szczepanski-Dresden, 1.10 mk.; Riese-Leipzig, 15.50 mk.; SAT-grupo Köln, 4.— mk. **Italio:** Ratto, S., 5.— lir. it.; Carena, C., 5.— lir. it.; 1631, 3.— lir. it.; Gatti, A., 7.— lir. it.: Setti, 3.— lir. it.; Turini, I., 2.— lir. it.; Gatti, B., 5.— lir. it.; Aguzzi, 5.— lir. it.; Cesari, E., 5.— lir. it.; Sampellegrin, G., 2.— lir. it. **Norvegio:** Muribo-Oslo, 1.50 kr. **Sovetio:** Ĝojvivulo-Nadeĵdinsk, 2.55 r.

Alvoko!

Ĉu ne ekzistas SAT-aninoj? Neniu el ili ĝis nun (4. 11. 25) respondis al mia peto ("S-ulo" n-o 4 p. 6). Tre helpas eĉ simpla fratinsaluto.

KORESPONDADO

TARIFO

Korespondado: Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. or., ĉiu plia linio la samon.

Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.

MALLONGIGOJ: L = *letero.* PK = *poŝtkarto.* PI = *poŝtkartoj ilustritaj.* PM = *poŝtmarkoj.* bfl = *poŝtmarko sur bildflanko.* k.ĉ.l. = *kun ĉiuj landoj.* esp.aĵo = *esperantaĵo.*

Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

Aŭstrio

— K-do *L. Tabaka, Enzesfeld,* No. 82, dez. koresp. k. ĉ. 1. L., PK., PI., certe resp.

Ĉekoslovakio

— K-do *Viktor Potysz, Karvinná, No. 884,* (Silezio), dez. koresp. k. ĉ. l. PK., PI., L., PM., certe resp.

— K-do *Václav Sùh,* Neumer, 19, p. *Holyŝov ap. Plzen,* dez. koresp. k. ĉ. l., L., PI., PK.

Germanio

Adresŝanĝo: K-do *Johann Wutte* (4671), *Gross-Oelsa, Bez. Dresden* (antaŭe en Admont-Aŭstrio).

— K-do *Fritz Götze,* Jägerstr. 6, II. *Altenburg i. Th.* dez. koresp. pri vivkondiĉoj, L., PK., PI., k. ĉ. l.

— K-do *Walter Dinter,* Ludwigstr. 10, *Leipzig-Neustadt,* dez. koresp. k. ĉ. l. L., PK., PI.

— "Kursanoj de esperanto" dez. koresp. kun aliaj gelernantoj el ĉ. l., certe resp. Adresu ĉion al: K-do *H. Dey,* Weuenstr. 17, *Essen-West.*

— K-dino *Hanjo Teichmann,* Gabelsbergerstr. 3, II. r., *Leipzig-Reudnitz,* dez. koresp. pri ĉ. temoj k. ĉ. l.

— "*Membroj de Prol. Esp. Grupo*" dez. koresp. pri ĉ. temoj k. ĉ. l. Respondo garantiata. Bonvolu skribi al: K-do *Rudolf Szczepanski,* Alaunstr. 32, III. *Dresden-N. 6.*

Adresŝanĝo: K-do *O. Jeserick,* Siedelung Fuchsberge, *Jüterbog* (stratŝanĝ).

— K-do *Max Somerer,* Reuthstr. 3, *Selb i. Bay.,* dez. koresp. k. ĉ. l., PI., PM.

— K-do *Reinhold Ullrich,* Papstkolonie 8, *Selb i. Bay.* dez. ĉiulandan korespondadon.

— K-do *Alfred Krause,* Artilleriestr. 4, *Magdeburg,* serĉas seriozajn korespondantojn el ĉ. landoj, L., PK., PI., nepre resp.

Nederlando

— "Sekcio de la Nederlanda Federacio de Lab.Esperantistoj" aranĝas letervesperon, ĉion kio koncernas lab. movadon aŭ a. temojn sendu ĝis 1. febr. 1926 al: *C. de Klerk,* Mackajstraat 32, *Hago.*

Sovet-Unio

— Laborista Esp. Grupo ĉe klubo "Ruĝa Metalisto" dez. koresp. kun samaj grupoj. Adr.: *Klubo "Krasnij Metalisto" esp. Kruĵok,* Korobelnaja, *Sepastopol.*

— Grupo de esp.-fervojistoj ĉe Leningrad-Moskva fervojo dez. koresp. pri ĉ. temoj k. ĉ. l., ĉiam resp. Adr.: *Birĵakov,* Nevskij prosp. 153, kv. 19, *Leningrad.*

Adresŝanĝo: K-do *Bojev Sergio,* Vetotdel Narkomzema, *Poltorak* (antaŭe en Orenburg).

— K-dino *Zemskova Valentina,* ĵurnalistino, *Novonikolajevsk,* (Siberio), str. Kommunistiĉeskaja, 82, dez. koresp. kun k-doj el ĉ. l.

≡ RADIO ≡

Okaze de la ekspozicio por Radio aranĝita de la germana Lab. Radio-Klubo la 14.—22. nov. k. j. en Leipzig, vickomisaro por poŝto kaj telegrafo Lubovi, Moskvo parolos esperante la 21. nov. je l' 20. h. 5 min. laŭ MET (mezeŭropa tempo). Ondlongo 1450.

Profesia Unuiĝo de ledistoj en Leningrad

Proponas al alilandaj laboristoj interligiĝi kun ni per korespondado pri sociaj, kulturklerigaj kaj aliaj demandoj.

Adreso:

Leningrad, Dvorec Truda, Sojuz Koĵevnikov Adaŝevu

PRESEJO: UNS-PRODUKTIVGENOSSENSCHAFT, LEIPZIG (GERMANIO)